2-a Jaro, N-o 6 (58)

APERAS S.A.T. SEMAJNE

5. Novembro 1925

ESPERANTO JE LA SERVO DE L' TUTMONDA PROLETARO

SENNACIULO

OFICIALA ORGANO DE SENNACIECA ASOCIO TUTMONDA

Korespond-adreso: "Redakcio de Sennaciulo", Colmstr. 1, Leipzig-Stö. (Germ.) | Gvidanto: Ekzekutiva Komisiono de SAT 23, rue Boyer, Paris XX | Administranto: R. LERCHNER Colmstrasse 1, Leipzig-Stötteritz

Konferenco en Locarno

En la belega svisa urbeto Locarno, kiu kuŝas ĉe la Lago-Maggiore — proksime de la itala limo, okazis dum la pasintaj semajnoj konferenco de la Ligo de Nacioj. Tiu konferenco havis la celon, garantii por la estonto la mondpacon. Kiamaniere oni solvis tiun tre tiklan problemon?

Estas akceptita de la konferenco t. n. "Okcidenta kontrakto", kiu koncernas la landojn Germanio, Belgio, Francio, Anglio kaj Italio. Tiu kontrakto regulas la limojn inter Germanio kaj Belgio, Germanio kaj Francio. Ĉu restos okupataj partoj de la Rejn- kaj Ruhrregiono flanke de Francio kaj Belgio, ne estas definitive solvita en la kontrakto. Sed la artikolo VI. diras, ke la nuna kontrakto ne tuŝas la rajtojn kaj devojn, kiujn jam solvis la packontrakto de Versailles kaj la Dawes-kontrakto. Laŭ artikolo II. de la kontrakto la intertraktintaj ŝtatoj ne almilitu unu la alian, escepte, se iu estos atakita kaj sekve devas defendi sin, aŭ se la Ligo de Nacioj decidis tian militon.

Ĉiuj diferencoj inter la nomitaj ŝtatoj estu nuligotaj per pacaj rimedoj. Por ĉiuj eventualaĵoj la konferenco elektis konstantan komisionon kvinmembran, kiu helpu nuligadon de estontaj diferencoj. Se tiu interpaciga komisiono ne sukcesos solvi la eventualajn diferencojn, tiam estu submetotaj la diferencaferoj al internacia aŭ eĉ al eksterordinara juĝejo.

En artikolo IX. estas difinita, ke la britaj imperioj, inkluzive Hindio, per tiu kontrakto ne stariĝos sub iu ajn devo, do ili tute ne estas entenita en tiu kontrakto. Anglio en ĉiuj rilatoj konservas sian memstarecon.

Entute — mankas nur ankoraŭ la gluaĵo, por glui unu folion de la kontrakto sur la alian, por ke la tuta kontrakto ne disfalu. En Locarno oni intertraktas por eviti estontajn militojn — En Maroko, Ĉinio, Hindio, Greklando, Bulgario, en la tuta mondo okazas intertempe aliaj intertraktadoj — perpafilaj.

Ĉu estas eble, per tiu konferenco garantii la mondpacon? La antaŭaj frazoj jam parte donas la respondon. La kapitalista klaso provas per ĉiuj ajn rimedoj konservi la nunan kapitalistan sociordon. Sed la krizo de la kapitalismo tamen kun ĉiu tago pli akriĝas. Unu kapitalista lando estas la diablo de la alia. Oni provas garantii la pacon en la eŭropaj landoj, dume okazas bataloj en ekstereŭropaj landoj, en la kolonioj, inter la eŭropaj imperialistoj. La iamaj importlandoj ekstereŭropaj fariĝis dum la mondmilito eksportlandoj. Sekve nun por la produktaĵoj eŭropaj mankas landoj konsumantaj tiujn produktaĵojn. Do, la tuta krizo kaj batalo? — pro la prefera influo sur la mondkomercejo.

Intervenis la batalon sur tiu kampo alia lando, la proletara Sovet-Unio. Sovet-Unio per sia porbezona produktado superas jam nun sur la mondkomercejo ĉiujn imperialistajn, kapitalistajn landojn. Pro tio ankaŭ tiun fakton, kaj precipe ĝin, oni devis trakti en Locarno.

Antaŭ komenco de la konferenco en Locarno la rusa popolkomisaro por eksteraj aferoj Tschitscherin (Ĉiĉerin) entreprenis vojaĝon al Varsovio (Polio) kaj al Berlin (Germanio). La celo de tiu vojaĝo estis, intertrakti kun la pola kaj germana registaroj, komercajn kontraktojn. La pola kaj ankaŭ la germana registaroj konsentis kaj akceptis tian kontrakton, sed tio estis ja kontraŭ la interesoj de la aliaj kapitalistaj landoj. Polio per tio alproksimiĝis pli al Sovet-Unio, ĝi fariĝis pli sendependa de la franca kapitalo. La sama koncernas al la germana kapitalistaro. Do, oni devis bari tiun vojon al oriento.

Estas akceptita en Locarno t. n. "Orienta kontrakto", kiu entenas kontraktojn franca-polan kaj franca-ĉekoslovakan. Laŭ partoj el tiuj du kontraktoj, publikigitaj de la angla registaro, Francio garantias al Polio kaj Ĉekoslovakio la militaristan helpon, okaze se Germanio atakus unu el ambaŭ ŝtatoj. Per tio la Okcidenta kontrakto estas nuligita, ĉar tiu ja difinas la nedifektecon de la germana limo okcidenta. La nova franca-pola kontrakto permesas al Francio, okaze de germana-pola konflikto, transiri la germanan limon okcidentan kaj marŝigi siajn trupojn tra la Rejnlando.

Sed kio estas la plej grava. Se okazos konflikto ĉe la rusa-pola aŭ rusa-ĉekoslovaka limo tiam la germana registaro estas devigata, permesi al la francaj, anglaj, entute al la trupoj de la Ligo de Nacioj ilian marŝon tra Germanio. Kion oni intertraktis malantaŭ la kulisoj ne jam estas konata. Sed, se fakte okazas konflikto inter Sovet-Unio kaj Polio aŭ Ĉekoslovakio, tiam ankaŭ la germanaj trupoj devas marŝi kontraŭ Rusio komune kun la aliaj trupoj de la Ligo de Nacioj. Tio estas la vera esenco de la Locarno-a konferenco. Kaj, se la momento estos favora por tiu atako, tiam la "neŭtrala" Ligo de Nacioj ne eĉ atendos unu momenton.

La tuta konferenco estis nur grandskale entreprenita teatro. Pri gravaj temoj (senarmiligo, forigo de kaŭzoj por la krizo kapitalista ktp.) oni ne akceptis iun ajn definitivan decidon. Por ĉiu proleto la celo estu klara. Precipe tiu konferenco montras al ni, ke la krizo en la kapitalista sociordo ne estas forigebla. Pro tio: For kun tiu sociordo malnova! Nur sincera, plej aktiva batalo porklasa gvidos la proletaron al vera mondpaco, al kontentigaj cirkonstancoj porvivaj. *715.*

Kun la germana delegacio laborista al Sovetlando!

IV.

En la lasta parto mi priskribis la akcepton kaj la sentojn de la laboristaro. Certe interesa ankaŭ estos por niaj k-doj kelkaj renkontoj kaj intervjuoj, kiujn ni havis dum nia restado en Moskvo. Ni komencis niajn vizitojn ĉe Bucharin, unu el la plej gravaj gvidistoj de la nova Rusio. Kune kun la svedaj k-doj, kiujn mi antaŭe jam menciis, ni aŭdis paroladon pri la situacio de Sovetio kun la aliaj ŝtatoj. Li donis al ni bildon de la evoluo kaj la senco de la rusa proleta ŝtato, bedaŭris, ke en la vicoj de la eksterlandaj malamikoj ankaŭ troviĝas socialdemokrataj gvidantoj, inter alie li respondis je la broŝuro de Kautsky pri la hodiaŭa komunista Ruslando. Li klarigis al ni, ke rusa registaro kaj popolo nur povas bezoni epokon de paco, kaj iu ajn milito nur detruus la ĵus, kun multaj fortoj, ekstarigitan ekonomion kaj industrion. Nature, li diris akcente, ke rusa proletaro ne lasu sin deteni, helpi al aliaj popoloj, kiam tio necesas.

Entute la impreso ĉe mi estis, ke k-do Bucharin tre klare kaj malrevite ekkonas la estantan staton de la mondpolitiko kaj ankaŭ la staton de la diverslandaj gelaboristoj. La kunsido mem perdis ion de la graveco, ĉar ni estis en sumo pli ol 300 k-doj, kaj pro la granda salono ni ne povis tiel bone interparoli, kiel ni deziris. Speciale bedaŭrinda fakto estis, ke oni devis paroli trilingve; la tradukado estas ĉiufoje por la nekomprenintaj k-doj tre enua. En tiu momento mi ree ekkonis la grandan signifon de Esperanto, kaj la ĉeestantoj mem sentis la mankon de komuna lingvo.

La esperantistoj triumfis, nenio povis esti kontraŭdirita al niaj argumentoj. Pli efike kaj ankaŭ pli sukcese estis nia renkonto kun

k-do Trocki.

Tiu k-do estas unu el la plej konataj en la tutmondo Komence de la revolucio li kreis la ruĝan armeon, li poste estis la popolkomisaro por trafiko kaj hodiaŭ li estras la oficon por koncesio, tre grava posteno por la soveta ekonomio. Oni diris al ni, ke li estas ŝatata kiel unu el la plej kapablaj el la rusa gvidantaro, lerta kaj sperta ĵurnalisto, kaj bona kunlaboranto en la plej multaj demandoj de Sovetio.

Enirinte kaj salutinte lin, ni tuj komprenis, ke li pro sia fera energio kaj granda scio povis doni al la proleta revolucio potencan ruĝan armeon. Lia aspekto estis tre simpatia al ni, kaj en fluaj germanaj paroloj ni estis de li petataj, diri niajn demandojn, ĉar ni vizitis lin por ekscii ion pri la koncesia politiko. Ni ĉiuj scias, ke en preskaŭ ĉiuj landoj kapitalistaj oni asertas, ke en Ruslando ree estas enkondukita la kapitalismo en pli akra formo ol en la propraj landoj. Eble pro tio, por detrui la falsaĵojn, mi pli detale volas priskribi, kion li diris al ni. En koncentrigitaj frazoj li klarigis jenon:

"La registaro de ĉiuj unuigitaj respublikoj rajtas utiligi ĉiujn naturajn valoraĵojn, kaj disponas ankaŭ pri la pli grandaj industriaj entreprenoj. Pro tio la registaro povas doni al certaj kapitalistoj diversajn koncesiojn, kiuj rajtigas la ricevantojn ekspluati la riĉaĵojn de la tero; nature tiuj koncesioj estas esceptoj de la ĝenerala leĝo. Nun la koncesiposedantoj ne povas fari sur la al ili pruntitaj terpecoj kion ili volas. Ili estas enkadrigitaj en diversaj kondiĉoj, pri kiu jeno estu dirita: La kapitalistoj estas devigitaj, doni de la profito la duonon al la ŝtato, due, ili devas enkonduki kaj uzi la plej modernajn ekspluatilojn, ili povas konstrui fabrikojn kaj domojn tiom, kiom ili volas, sed kiam la daŭro de la kontrakto finos, ili devas forlasi la posedaĵon en la tiama stato, ĉio tiam fariĝos propraĵo de la ŝtato. Per tiuj-ĉi koncesioj la soveta registaro intencas plirapidigi la enkondukon de moderna industrio kaj evoluigi la ekonomion pli akre.

Ĉefaj kondiĉoj do estas unue, ke la grundo restis sovetia propraĵo, due ne devas esti aliigitaj la rajtoj kaj institucioj por utilo de la laboristaro. Devas resti la influo de la sindikatoj, la fabrikkonsilantaro, entute ĉio devas funkcii, kio estas leĝe fiksita por la tuta Sovetŝtato. Laboro kaj asekuro direktas sin laŭ la ĝeneralaj kondiĉoj. Pri la okupado de eksterlandaj laboristoj, la kapitalistoj estas rajtigataj enkonduki nur tiajn kvalifikitajn laborantojn, kiuj mankas en la lando mem.

Pri la nombro de la diversaj koncesiaj kontraktoj, donitaj ĝis hodiaŭ mallonge mi diras, ke nur 4% de la tuta industrio, kalkuliĝis je koncesioj, 4,6% de la laboristaro de tutsovetlando estas okupitaj en tiuj uzinoj.

Fine nur estu rimarkata, ke la plej grandan parton de la koncesioj posedas Germanio.

K-do Trocki opinias, ke Ruslando momente estas sufiĉe forta, ke ĝi povas doni pli da koncesioj ol ĝis nun. K-do Trocki pruvis, ke tio, kion li diris al ni, estis aŭtentika materialo, kaj montris ankaŭ, ke la raportoj kaj artikoloj de eksterlanda gazetaro estis kalumniaj.

La domo de la oficejo estis tre luksa, antaŭa posedaĵo de grandbienulo, kaj donis post nia vizito la certecon, ke nuntempe ĝi servis por pli bona celo ol antaŭe, kiam la provincaj riĉuloj tranoktiĝis en ĝi. Dankante ni adiaŭis de k-do Trocki por serĉi novajn informojn.

En la tendaro de la Ruĝarmeo.

Ekstere de la urbo en arbaro troviĝas la tendaro "Oktobro". Dum la varmega somero la armeo transloĝiĝas en tendoj sur libera kampo. Tien la delegacio turniĝis por studadi la vivon kaj la strukturon de la plej konvinka por eksterlandaj, malamikaj ŝtatoj potencilo de Sovetio. Tendo apud tendo etendiĝis en longaj vicoj, ĉiuj loĝejoj por grupoj ĝis 12 soldatoj. Ke ni povis prijuĝi la staton, evidentiĝas el tio, ke ni ĉiuj mem estas "defenduloj de la patrio".

Ni renkontis la soldatojn dum la taga servo. Je nia alproksimiĝo la ekzercado estas interrompita, kaj en mallongaj paroloj la tendara komandanto salutis nin, kiu nur per kelkaj malgrandaj steloj sur kolumo diferencis sin de la simpla soldato. Post kiam ni estis bonvenitaj, ni trairis la 5 klm longan tendaron. Antaŭ ĉio nin surprizis la pureco de la malluksaj tendoj. La vojoj puraj kaj dekstre kaj maldekstre ornamitaj per mosaiklaboro, farita el multkoloraj ŝtonoj en liberaj horoj de lertaj soldataj manoj. Ĉie, en la ĝardeno, en la tendoj ni trovis la bildon de Lenin, montrante per tio, ke li estas tre kara al la koro de ĉiu.

La servo mem daŭris potage 8 horojn, kiuj ne estas malŝparitaj per sensenca, arbitra "drilo", kiel kutime en armeoj kapitalistaj. Plej granda parto nature estas la soldataj ekzercadoj, tamen oni ankaŭ plenumas kulturan taskon per elementa, ekonomia kaj politika instruado al ruĝarmeanoj. Forlasinte la devigan servon en la armeo post la servtempo, la soldatoj fariĝis la plej taŭgaj kaj lertaj agitatoroj por la proleta afero, kaj ĉar la plej multaj el ili devenas de la kamparanoj, ili varbas inter la kamparanaro kaj amikigas ilin al proletaro.

En la mezo de la tendaro kluba domo de armeo enhavas multelegatan bibliotekon, murgazeton kaj aliajn tempopasigilojn, kiel ŝakludiloj ktp. La kuirejo liveras por ĉiuj la saman manĝaĵon, kiu sufiĉas por plenigi la malsatajn stomakojn.

En speciala parto de la tendaro, aranĝita por kunvenoj, kinoj, teatraĵoj ni parolis en grandega mitingo al la ruĝa soldataro, kaj poste en multaj grupoj ni persone konatiĝis kun ruĝarmeaj k-doj. Ĉiu fiere rakontis pri la signifo de ilia armeo, kaj ili ankaŭ esprimis la plenan konscion pri ilia tasko en laborista ŝtato. Ĉiuj deziras, ke baldaŭ en Germanio estiĝu ruĝa armeo, ke tiam ambaŭ estos la forto, kiu donos al laboristaro tutmonda kuraĝon por nova batalo kaj kiuj helpas forigi por ĉiam la subpremon de niaj regantaj ekspluatantoj.

Reveturante Moskvon ni kunprenis la konvinkon, ke en kazo de neceseco ni trovos helpon de la rusa popolo.

(Daŭrigota) *Willi Bennewitz, 2378*

Eksplodo en pulvorfabrikejo

La 20. oktobro eksplodis pulvorfabriko proksime de Hannover (Germanio). Hazarde estas mortigitaj nur du personoj, unu per ŝtono, forĵetita per la eksplodo pli ol 200 metrojn. Krom tio estas vunditaj unu virino kaj du infanoj kaj tri pluraj personoj en najbara domo. La kaŭzoj? Tro longa labortempo kaj precipe, ke oni jam denove fabrikas pulvoron por nova mondbuĉado.

Striko de la tramistoj en Frankfurt a. M.!

Depost la 18. oktobro la tramistoj en Ffm. strikas. La burĝaro estas surprizita kaj furiozas, ĉar oni antaŭe ne atentigis publike pri la striko intencota. En la burĝa gazetaro oni insultas skribante, ke ĉi striko similas al iu fiagado, kiu nur dum la revolucio estis ebla. Sed ne nur la burĝaro, ankaŭ la proletaro estis surprizitaj pro la fina kuraĝo de la tramistoj, jam depost 5 jaroj ili traktadas pro pli bonaj laborkondiĉoj, sed ĉar ne ĉiuj estis organizitaj, striko ne estis ebla. La striko estis aprobata kontraŭ 5 voĉoj, ĉi fakto montras la mizeran staton de la tramistoj, kiu ankoraŭ estus pli sentebla per la nova tarifo, kiun oni intencis donaci al la sklavoj. La kaŭzoj de la striko estas jenaj: La laborkondiĉoj de urbaj tramistoj estas reguligataj laŭ regna tarifo. La ĝisnuna meza labortempo estis 9 horoj dum 14 hora deĵortempo potage, kaj oni rajtis pli altigi la deĵortempon ĝis 16 horoj. Ĉiu, kiu konas la streĉan kaj danĝeran laboron de grandurbaj tramistoj scias, ke ĉi deĵortempo estas tro streĉa kaj jam pravigas strikon. La nova regna tarifo, pri kiu oni nuntempe traktadas, pli altigas ankoraŭ la labor- kaj deĵortempojn ĝis 10 horoj respektive 16 horoj. Krome, ĉi tarifo postulas ankoraŭ atendan deĵoron, kiu estus pagota nur per 30% de la salajro. La tramistoj postulas 8 horan labortagon, pli altan salajron kaj po monatan pagadon de la salajroj. La po monata pagado kiel trafikoficistoj laŭ mia opinio estas danĝera, eble la estontaj oficistoj perdos la revoluciemon kaj proletan senton, kiu ĉe multaj Frankfurtaj tramistoj estas ne tro fortaj. Hodiaŭ, la 6. tagon de la striko oni povas konstati, ke, pro la unuecfronto, la tramistoj jam venkis en kelkaj gravaj punktoj, kaj pro la intereso de la Frankfurta laboristaro estus plena venko dezirinda. Strangan rolon ludas, en ĉi batalo, la ŝoforoj kaj aŭtomobilposedantoj. Ili sovaĝe veturegas tra la stratoj transportante homojn. En unu ŝarĝaŭtomobilo oni nombris 94 personojn, kiuj pagis po 50 pf. por 20 minuta veturado, kie restas ilia solidareco? Espereble la striko baldaŭ finiĝos per la venko de la tramistoj. *SAT-ano 320*

Justeco en Germanio

La Berlina verkisto *Leo Lania* publikigis en la jaro 1924 libron "Pafiloj vojaĝantaj", kiu senmaskigis la ŝovadon kun armiloj flanke de la faŝistaj kaj kontraŭrevoluciaj unuiĝoj en Germanio. La germana prokuroraro tamen ne provis trovi la senmaskigitajn vojojn de la armilŝovantoj, sed ĝi postulas de *Lania* la nomojn de liaj informintoj por ilin tiri antaŭ la forumo de la klasjusteco. *Lania* rifuzas konigi al la prokuroro liajn informintojn, pro kio li nun ricevis monpunon. Krom tio oni minacas al li per aresto, se li plue rifuzas konigi liajn atestantojn.

Letero el Jugoslavio

Nikola Paŝić, 82jara maljunulo ministroprezidanto de nuna jugoslava registaro, aŭ pli trafe dirite: spirito de ĉiuj reakciemaj faroj, rilate al laboristaro, en tiu lando de fama Balkano — estas reveninta el mondfamaj eŭropaj banejoj. En Karlove Vary (Ĉekoslovakio) pro kuracado li estis rezervinta je sia persona dispono la tutan multekostan hotelon. Kronikkutime ni citu, ke okaze de lia alveturo en Karlove Vary prezidanto de Ĉekoslovaka Respubliko, idolo de naciem-burĝa elemento de Ĉekoslovakio T. Masaryk, estos direktinta al li telegramon dezirante lian resaniĝon "je bono de jugoslava monarĥio kaj tuta slavaro". Ĉu ne estas ridinda komplimento, ke oni al unu maljunulo, troviĝanta jam antaŭ la tomba kruco deziru resaniĝon?

Ĉu vi aprobas tion Sovetlandanoj kiel slava popolo, kiel parto de tiu slavaro? Ne bezonas respondi. . . Filozofo T. Masaryk malsincere faris tiun komplimenton, kion estus farintaj same aliaj politikuloj, sed kial miri? Ili alkutimiĝis mensogi kaj diri malveraĵon, ĉar en ilia politika organizacio makiavelismo estas principo. Tiaj estas fiburĝoj, politikuloj el kiuj nek prezidanto kaj filozofo de Ĉekoslovaka Respubliko diferenciĝas.

Kio estas pli konstatinda kaj kio nin pli koncernas estas jeno: Jugoslavoj senlaboruloj kaj invalidoj malsategas, dum maljuna neresanigebla fikranio estas rezervinta multekostan hotelon en fama banejo Karlove Vary. Suferantaj laboristoj baraktantaj kun siaj familioj en mizero kaj malhavaĵo ĉu ne koleriĝu antaŭ ĉi-fakto? Ĉu ili ne estas pravaj kriegi: krimulo, rabisto!?

Pririgardu ni iom tiun 82jaran maljunulon. Antaŭ, dum kaj post milito li estis kaj estas vera reĝo en la lando. Se li diras detroniĝu la reĝo — la reĝo estas jam forigita. Tia potenco troviĝas en liaj manoj. — Li estis tiu fama krimulo kiu kaŭzis la mondmiliton, ĉefa iniciatoro kiu estis forpelinta tutan popolon sur mondmilitan buĉejon, homo kiu elverŝis tiom da sango. Rezultato: centmiloj da mortintoj kaj tiom same da invalidoj kaj la lando detruigita. Li, post plena malriĉigo de la lando je homvivoj kaj havaĵo, jen forŝutas nun milionojn da dinaroj de tiu popolo por sia kuracado. Sed por glorigi sian regadon, siajn krimojn kaj fierecon li volas, ke tiu popolo en panteonigu lin. En Beogrado estas, laŭ lia volo, elkonstruota Panteono, kaj lia kaŝita deziro diras: mi volas unua eniri Panteonon . . . . Panteono signifas rea forrabo da milionoj al la popolo . . . De kie al tiu vera jugoslava monarĥo je dispono tiom da milionoj de dinaroj por pagi elluigitan multekostan hotelon? Du fontoj troviĝas, ŝtatbuĝeta mono kaj ŝtata en- kaj elliverada afero. Bezonas scii, ke iuj buĝetaj pozicioj estas al lia plena dispono, pri kiuj li ne devas doni iun ajn prikalkulon al ĉefa ŝtata kontrolejo. Alia fonto. Lia filo Rade Paŝić enmanigis la plej grandan parton de la en- kaj elliverado ŝtata kaj tiamaniere lia familio fariĝis Paŝić-profitkontorejo, ĉu oni ne ŝajnas legi fabelojn de orientaj reĝoj. — Jugoslava laboristaro, kiu tage estas turmentata kaj enkarcerigata scias pri ĉi-ŝteladoj. Nun, kiam li renkontas je ĉiu paŝo uniformitan ŝtatdefendulon, kiam ŝtato ĝis gorĝo armiĝis, al laboristaro jugoslava restas por nun mediti kaj malkaŝe organizi sin. *Adriatikuloj.*

Krio de netolerebla doloro

Karaj kamaradoj!

Ni turnas nin al vi, kun varmega peto, levi vian voĉon de protesto kontraŭ tiuj bestaj kaj kruelaj, torturaj kaj barbaraj mokegoj, al kiuj ĵus submetiĝas laborista kaj vilaĝana junularo en okcidenta Blankrusio.

Ĉiutage kreskas kaj fortikiĝas revolucia movado en "kresoj" kaj ĝi frenezegigas polan registaron. Burĝaro decidis ne halti antaŭ iuj rimedoj, neniigi, mortpremi "bolŝevikan bacilon". Kaj "defenziva" (pola gardeto) jam komencis sian laboron.

Tiu ekzekuto, kiu nuntempe okazas en okcidenta Blankrusio, ne havis similan antaŭe en Polio. Ĝi povas nur simili kun okazintaĵoj en Bulgario kaj Rumanio.

Kiel teatro de ĉi-tiuj "agoj" estas nun Bjelostoka distrikto. Jam dum tuta monato polico ruinigas unu post alia niajn rajonojn (subdistriktoj), arestas ne nur komunistojn kaj komjunulojn *sed centojn da senpartia laboristjunularo.* Polico timas teni ĉiujn arestitojn en unu granda centro — granda urbo laborista — Bjelostok. Kaj kiel centran karceron ili elektis malgrandan malofte vizitatan urbeton Bjelsk. Ĉiutage el Bjelostok, el Zabludova, el Svisloĉ, el Miĥajlovo, el Suprasli, kaj aliaj diversaj vilaĝoj kaj vilaĝetoj ili enveturigas en Bjelsk novajn kaj novajn arestitojn, kiuj estas multe batitaj.

En Bjelsko nun jam troviĝas preskaŭ 600—700 arestitoj. Ili jam plenigas ne nur malliberejon, sed ankaŭ hospitalon, kiu nun transformiĝas en malliberejon kaj aliajn domojn. Arestitojn neniu povas viziti, ne doni eĉ por ili manĝaĵon.

Loĝantoj de Bjelsk rakontas, ke ili jam forgesis pri dormo.

Nehomaj, animdisŝirantaj krioj kaj ploregoj de arestitoj, kiujn oni aŭskultas de malliberejoj, tage kaj nokte, ne donas eblecon dormi trankvile, ne nur al laboristoj, sed ankaŭ al burĝaro de Bjelsk.

Ĉiujn arestitojn oni batas per pugnoj, bastonoj, skurĝoj, batilŝtipoj, botoj, vergas per vergoj, nudajn kalkanojn bruligas per ardigita fero, trenas sur planko per hararo, elŝiras harojn, enirigas kudrilojn sub ungoj, rompas fingrojn inter pordoj, enirigas inter fingroj bastonetojn kaj poste kunpremas manon.

Tra nazo verŝas po 7 botelojn da akvo, tra gorĝo verŝas varmegan salan akvon, alligas piedon al kapo kaj poste batas al kalkano per bastono ktp. ktp.

Tio montras bildon de neaŭdita kruel-eco, kaj sadismo, kiam iu komisaro de defenziva esplordemandas kaj torturas, trankvile fumas cigaredojn kaj poste per tiu sama cigaredo bruligas lipojn de torturita junulo aŭ laboristo.

Post unu horo aŭ unu kaj duona horo eĉ forta homo perdas konscion. Sed torturo ne finiĝas. Senkonscian arestiton oni surverŝigas per malvarma akvo kaj denove lin batas, rompas fingrojn ĝis nova sveno.

Kamaradoj! Nia junularo neniam scias pri liberaj cirkonstancoj por laboro. Ni naskiĝis kaj kreskis inter arestoj, torturoj ktp. Ni al ĉio kutimiĝis. Sed tio, kio nun estas en Bjelsk eĉ nin devigas ektremi. Ni ankoraŭ kun pli granda energio kondukos nian laboron, rekonstruas detruitan per pola polico laboristajn rajonojn. Kaj junularo laborista vilaĝana, unuiĝas.

Ni ne havas legalan gazeton, ni eĉ ne havas eblecon paroli libere, ni eĉ ne povas protesti kontraŭ krueloj kaj perfortoj sub nia nomo. Sed ni havas vin — niajn liberajn fratojn.

Ni turnas nin al vi kun nia krio de netolerebla doloro! Okuloj de ĉiuj 700 torturitaj homoj en Bjelsk turniĝis al vi en Sovet-Blankrusio! Kamaradoj! Rakontu al ĉiuj laboristaj kaj vilaĝanaj junuloj pri nia batalo, pri iliaj okcidentaj fratoj.

Laborista junularo per ĉiuj viaj fortoj helpu al Int. Ruĝa Helpo — al nia sola frato kaj helpanto en nia senfina malfacila batalo. Viaj varmegaj protestoj kontraŭ mortekzekutoj de k-doj Botvin'a, Gibner, Rutkovskij kaj Knievskij faris sian aferon ili devigis priparoli pri tio "societan opinion" de demokratia Eŭropo.

"Pretz z karon schnurchi"! "For mortekzekutoj"!

Diru al Eŭropo pri nova ne aŭdita mokego en Bjelsk. Tie okazos granda maljustaĵo. Tie sen juĝoj oni mortigas homojn. Ĉiutage oni elveturigas po 8—10 jam mortajn kamaradojn.

Ni blankrusaj esperantistoj tutkore protestas kontraŭ tiu malmodesteco de pola registaro! Proletarioj de l' tuta mondo! Esperantistoj! Aliĝu al nia protesto! Helpu al laboristaro en Polio.

Blankrusia Centra oficejo de Sovetlanda Esperantista Unio.

Jan Klys, D. Snejko, Baranovskij, P. Kirjuŝin, Peterleijter, Proĥorĉik, Maksimov.

Paradizo de la demokratio

En Ĉekoslovakio la revolucia gazeto "Rude Pravo" aperigis antaŭ nelonge statistikon pri la historio de la laboristaj persekutoj en la Masaryk-a respubliko. Laŭ la statistiko la perforta subpremo de la revolucia proletaro depost decembro 1920 kostis kvardek-tri mortigitojn kaj pli ol cent-kvindek grave vunditojn. En nenombrebla vico da procesoj *pli ol sep miloj da jaroj* kruela karcero estas surpremita al la akuzitoj. Kaj tiu paradizo de demokratio estas regata de homarano kaj filozofo. *Masaryk* li nomas . . .

La pastroj en Estonio malpaciĝis!

Kio do okazis kun la pacaj ŝafpaŝtistoj? Ĉu iu ŝafo forkuris al iu alia paŝtejo, aŭ ĉu iu paŝtisto ŝtelis la ŝafojn de alia? Nek la unua nek la lasta estas okazinta, sed okazis, ke la tuta estonia pastraro, aperante en formo de konsistorio, kondamnis kaj eksigis el siaj vicoj pastron V. Kuljas. La konsistorio estis ricevinta plurajn plendleterojn, ke pastro V. K. estas herezulo. Li malagnoskas eston de Kristo kaj liaj mirakloj. En la preĝejo V. K. ne predikas tiel, kiel estas ordonite de dio. Krome li mem verkas ekleziajn kantojn, kiuj estas volonte kantataj de la tuta paroĥanaro. Li estas aranĝinta publikajn kunvenojn, kie li estas dirinta ke, ĉu efektive tio estas miraklo, se iu viro promenus sur nia apudurba lago? Ĉiuj rigardontoj dirus, ke li estas komedianto, trompulo aŭ iu alia. Kristo estas farinta neniun miraklon.

Kiel dirite, li ne kredas eston de Kristo.

La konsistorio, konsiderante la leterojn, postulis, ke V. K. venu al ilia kunveno, kie oni debatos la aferon. Tie oni prezentis al li kelkajn demandojn, interalie ankaŭ la sekvantajn:

La konsistorio: Kion opinias pastro Kuljas pri la reveno de Kristo?

V. K.: Kristo estas jam veninta, ne necesas plu veni. Espero pri "reveno" estas manko de la religio.

La konsistorio: Ĉu la penoj de l' socialistoj, plibonigi la nunan sociordon, egalas la instruon de Kristo?

V. K.: En paroĥanaro komenca, oni akcelis aŭ disvastigis komunismon, kaj socialista sociordo estas sendube la plej prudenta solvo de la mizeroj ekonomiaj kaj klaskontrastoj.

La konsistorio: Ĉu kaj kiom multe estis Kristo mondpolitikisto?

V. K.: Sinjoroj, ne tedu min je politikaj demandoj, sed, se vi serĉas la dion, mi montros la vojon.

La plej grava kulpo estis, ke li estis panteisto, nekredanta dion personan. Solaj la konsistorio decidis ĉiesvoĉe kondamni kaj eksigi el la sankta ofico la "herezulon", kaj nomi anstataŭanton al lia preĝejo.

Sed kion diras la paroĥanaro? Ĉu ĝi ekĝojis pri la decido? Ne! La paroĥanaro ne agnoskas la decidon de la konsistorio. Pastro V. K. devas resti en la sama ofico kaj preĝejo. Eĉ unu penion[1]) oni ne pagos el siaj kasoj al la konsistorio, eĉ unu alian pastron oni ne enlasos la preĝejon. Oni esprimas malŝaton al la konsistorio, kiu volas perforte kovri la veron!

La konsistorio, havante nenian helpilon por plenumi sian kondamnon, nun sidas kune en sia ejo kaj meditas pri sataniĝo de la homaro kaj atendas la tempon, kiam revenos Kristo helpanta. Sed kiel dirite li estas jam veninta, ne necesas plua "reveno" kaj tial ankaŭ la decido estas neefektivigebla.

Tiaj "herezuloj", troviĝantaj pluraj en la malgranda Estonio, estas tre volonte aŭskultataj de multegaj homoj, pro ilia emo al reformigo de la eklezio.

Sed ĉu estas grave ĝin reformi? Ĉu laboristoj aŭ aliuloj profitos je tio?! Ne! Nek taŭgas nek necesas la reformata nek la malnova eklezio! Certe la plej bona por ĉiu laboristo estas la "satana" opinio: *sen religio!* *Joto.*

[1]) 100 penioj = 1,— mk. estonia.

Sciigoj el Azio

1. En Moskvon tra Siberio venis du aeroplanoj, senditaj el Japanio de gazeto *Asaka Asaĥi*. Ili estis solene akceptitaj sur moskva aerplanejo. La entrepreno bone montras ligon inter popoloj de oriento kaj okcidento. La flugistoj venintaj por simboli la ligon donacis al Kalinin (la tutunia ĉefo) grandan silke broditan bildon de konata japana pejzaĝo kun la monto Fuzi-jama, fotografita el aeroplano. En domo de sciencistoj okazis solena kunveno por honori la gastojn. Ĉeestis Ĉiĉerin (ĉefo de eksteraj aferoj), japana ambasadoro Tanaka kaj multaj gazetistoj. En multaj paroloj oni konstatis la progreson de ligo, kiu kreskas inter popoloj de oriento, instigata de komunaj interesoj. Fluginte tra Siberio, japanoj donis al ĉefa siberia gazeto "*Soveta Siberio*" esperantan leteron, kiu en nomo de Japanio salutas rusan popolon kaj esperantistaron kaj certigas, ke aerflugado, radio, esp-o kaj kino estas kvar plej gravaj ligiloj inter popoloj de tuta mondo.

2. Rusaj aeroplanoj el Pekin vizitis kelkajn ĉiniajn urbojn, ĉie ili estis kore akceptitaj. El Ŝanhaj 5. sept. ili venis Tokion, kie ili estis solene akceptitaj de japana popolo kaj aŭtoritatoj. La flugistoj ricevis belajn donacojn, ordenojn kaj laŭdojn pro sukcesoj de sovetia aeroflugado. La flugistoj havas kino-fotografilon kaj dum siaj vizitoj montras bildojn, kiuj portas klarigajn titolojn en ĉina kaj esp-a lingvoj. El Japanio aeroplanoj devas flugi Vladivostokon.

3. Sudĉinia generalo *Fynj-Juj-Sjan* konata sub nomo de "kristana generalo" timis pro akuzoj pri "bolŝevismo". Li publikigis ordonon al armeo. La ordono certigas, ke la generalo ne estas venkita de bolŝevismo kaj ne intencas sovetigi estratan de li provincon.

4. Ĉirkaŭ 200 ĉinoj, kiuj servas en angla ambasadorejo en Pekin, ŝtrikis por solidariĝi kun ĉiuj strikantaj laboristoj ĉinaj.

5. En *Czin Dao* pro ordono de provincestro *Ĉjan Czo Lin* estis arestitaj kaj mortpafitaj *Li Vej Lun* (estinta studanto de Moskva universitato de laboruloj de oriento) kaj *Ĥu Sin Cze* (redaktoro de loka radikala gazeto).

6. Dum nuna somero en Mongolio laboris amerikaj sciencistoj-esploristoj, gviditaj de prof. *Endrjus*. La sciencistoj havis suspektindajn helpantojn, kiuj topografis,

termezuris kaj agitis kontraŭ "ruĝaj bolŝevikoj". Ili spione esploris landon por militaj celoj. Registaro de Mongolio ellandigis ilin.

7. 17. aŭgusto en Ŝanhaj strikis pli ol 2000 poŝtistoj.

8. Estraro de Sovetia *Gosplano (Gos = regno, ŝtato)* diskutis prezojn de kruda kotono, rikoltita dum nuna jaro en orienta Sovetio (Turkestano kaj Kaŭkazo). Estas decidita meza prezo de unu kilogramo 2,85 kopekoj *(100 kop. = 1,94 de amerika dolaro)* en loko de aĉeto. La elspezoj por organizi liveradon de kotono ĝis Moskvo, ne devas superi 14 % de l' nomita sumo. La kosto de transporto, impostoj, la dumvoja perdo estas kalkulata aparte.

9. En minejoj de Koreo apud Ĥejo okazis eksplodo de mingasoj. Estas mortigitaj ĉirkaŭ 140 ministoj.

10. Dum ok monatoj de 1925 jaro ĉeftribunalo de *Tokio* anoncis, ke en Japanio bankrotis 312 entreprenoj. Ĉiuj 12 monatoj de 1924 jaro donis pli malmulte da fiaskoj. La fiaskoj okazis pro akraj komerc-industriaj krizoj.

11. En komenco de septembro tra Siberio veturis Moskvon *Karaĥan* (ambasadoro de Sovetio en Ĉinio). Li rakontis al laboristaj kunvenoj dum sia longa vojo (pli ol 10 000 kilom.), ke stato de revolucia kantona registaro estas tre serioza, ĉar ĝi devas batali samtempe kontraŭ du malamikoj — kontraŭ imperiistoj de okcidento kaj reakciuloj de Ĉinio. Estraro de *Gon-Kong* ĉiamaniere provokas intervenon de angla soldataro. Sed *Pekin* serĉas rimedojn por konsenti kun Gon-Kong kaj intencas protesti kontraŭ interveno de imperiistoj. La sorto de Gon-Kong en certa grado troviĝas en manoj de tutmonda proletaro kaj antaŭ ĉio de proletaro angla. Ĝenerale pozicio de Sovetio en oriento fortiĝas kaj baldaŭ devas atingi la ĝis militan.

12. Komerco de Sovetio kun Ĉinio kreskas. Petrolo kaj ligno de Sovetio penetris el Vladivostok eĉ en Kantonon. Registaro de Ĉinio intencas deklari monopolon de petrolkomerco kaj ĉiujn mendojn fari en SSSR.

13. Nuna Mongolio estas multe pli kultura ol ni pensas. Ĝi bone kaj tre rapide progresas gvidata de sia progresema registaro. Mi parolas pri "ekstera" Mongolio, t. e. pri Mongolio sendependa de Ĉinio. Antaŭ 2 jaroj malriĉa, tute rabita de sia pastraro mongola popolo kreis propran kooperativon, kiu bone funkcias tra tuta lando. Nun ĝi jam intencas estri eksteran komercon de Mongolio. En ĉefurbo de Mongolio *Ulan Bator* (Ruĝa Fortulo) 31. julio estis malfermita Kongreso de Mongola Kooperativo. Raportoj faritaj en la Kongreso montras, ke bilanco de l' kooperativo en nuna jaro egalas 9 000 000 dolarojn (unu ĉina dolaro = unu sovetia rublo). El SSSR. ĝi intencas enporti por 1 500 000 dol. ĉin. diversajn fabrikaĵojn. Eksporto de krudaĵoj el Mongolio egalos supozeble la saman sumon.

Maksim Krjukov.

INTER NI

— "Sennaciismo kaj kontraŭŝovinismo samsignifas", estas dirite en la protokolo de la V-a.

Mirige kaj strange! . .

Se mi ĉeestus la Kongreson, akre tian opinion mi rebatus. Kaj estas ja strange, ke vi mem ĉe tia diro ne eksaltis por ĝin plej energie kontraŭdiri kaj senkompate vipi la herezulon . . .

Tiel alparolis min juna, simpatia entuziasmulo. Kun riproĉa mieno kaj insista tono li atendis mian respondon. Kaj tiam mi sentis min kvazaŭ akuzato antaŭ juĝisto.

— Iel pravas via indigno, respondis mi. Tamen bonvolu kvietiĝi kaj kompreneme aŭskulti.

Ĉu do vi ne devis mem ofte prokrasti taskojn, tial ke aliaj ŝajnis al vi pli urĝe plenumendaj? Kion vi opinius pri iu, kiu akvumus en sia ĝardeno salatojn, dum lia domo forbrulas? Kredeble, vi pensus, ke tiu persono estas tute malsaĝa.

Nu, ĉe la V-a, la ĉefa, la urĝa tasko konsistis en tio, ke necesis fari ĉion eblan por konservi kaj plifortigi la necesecan unuecon en SAT. Ĉio cetera ŝajnis al mi tiam malatentinda kaj ne tuj zorgenda. Temis ja forigi la kaŭzojn de interdisputo por ke la spirita atmosfero de la Kongreso ebligu finfinan interkonsenton, unuanimecon. Tiel okazis. Kaj jen kial via iel prava riproĉo ne ŝajnas meriti seriozan konsideron.

Mi parolu al vi tute sincere kaj malkaŝe. Ĉu do estas tre grava la fakto, ke SAT-anoj povas havi eraran komprenon pri la signifo de la termino SENNACIISMO? Ne, tute ne gravas la afero. Kontraŭe. Ne malplaĉas al mi, ke sinceraj laboristoj, kiuj ne cerbumis longe pri la celo kaj taskoj de SAT, povas opinii, ke sennaciismo estas nur ia kontraŭŝovinisma koncepto. Nia organizaĵo ne devas esti ia sekto el teoriuloj, kutimantaj analizi la signifon de ĉiu termino; ĝi devas resti malfermita al ĉiuj senescepte esperantistoj, starantaj sur la klasbatala kampo.

Mi ja scias, ke patriotismo kaj kontraŭŝovinismo povas bone akordiĝi. Sed, mi ripetas, ne gravas se esperantista laboristo eraras pri la signifo de vortoj. Sufiĉas, ke, por apliki esperanton, la SAT-aparato devigu lin agadi en sennacieca kadro.

Tie kuŝas la gravaĵo. La cetero estas nur akcesoraĵo.

Sekve, estu certa, ke mi ne sidus trankvile kaj mute, se la parolo de nia nure kontraŭŝovinista kamarado riskus aliigi la strukturon sennaciecan de nia organizaĵo . . .

IUELIE.

Regna Kongreso de "Juna-Spartako" en Halle

De 10.—13. oktobro okazis en la fama klasbatala urbo *Halle* la dua regna kongreso de "Juna Spartako", t. e. ligo, kiu centre unuigas la komunistajn infanojnpionirojn. En la kongreso estis reprezentitaj 153 lokaj grupoj de Tutgermanio, kaj la dimanĉan manifestadon, kiu eksteren signalis la signifon de tiu kongreso, partoprenis 2500 infanoj, gepioniroj, kiuj procesiis tra la urbo kun freŝa, vivplena kantado, tumulte ovaciataj de la loĝantaro, kiu dense spaliris la demonstrantojn kaj kun admirinda fervoro prizorgis la infanojn dum ilia kelktaga restado en Halle.

La brila festvespero je la 10. kun teatroprezentoj kaj salutparoloj de junaj kaj maturaĝaj, kaj i. a. de franca, angla kaj norvega kamaradetoj, estis inda antaŭludo. Dimanĉon matene ni aŭskultis la unuajn referatojn de infanoj kaj unu paroladon de instruistino, kiu estis kun la geinstruista delegacio en Sovet-Unio, pri la pionirmovado kaj edukmetodoj en Rusio. Malgranda knabo el Berlin, ĵus reveninta el Sovetio, raportis tre vigle pri la Internacia Konferenco de infanoj okazinta en Moskvo. Lia parolado kaj tiu de pionirino pri la rusa pionirmovado devis anstataŭi la raportantojn el Sovet-Unio mem, ĉar ilin la registaro ne estis enlasinta Germanion. Tamen la registaro ne povis malhelpi, ke spiritaj ligiloj kaj fratsentoj inter rusaj kaj germanaj gepioniroj forte sentiĝis kaj forte intertuŝiĝis. Ĉiam, kiam oni aludis pri la 1½ miliono da organizitaj infanoj en Sovet-Rusio, la koroj de la etuloj batis pli forte, la okuloj brilis pli arde.

Gravajn temojn pritraktis la kongreso. En Germanio minacas la nova "regna leĝo por lernejoj", kiu liveros denove la lernejojn al la spirita sklavigo de la reakcio, ilin transdonas al la religiuloj kaj ideologe vendas al la pastroj kaj iliaj helpemuloj. La kongreso montris, ke ne nur plenaĝuloj, ne, ke eĉ la infanoj mem estas pretaj, kontraŭagi siaflanke al la perfortoj de nuna reĝimo. Pri la "lukto de l' infanoj en la lernejo" (kontraŭ nacisismo, kontraŭ batsistemo) ekestis vigla diskuto. La neceseco formi *ĉelojn* en la lernejo, cele de kuniĝo por la lukto, estis akcentata. Siajn specialajn spertojn donis la sentimaj batalantoj en Bavario kaj Turingio, kie la infan-organizaĵo estas malpermesita kaj laboras nelegale. Ne nur *en* la lernejo, sed ankaŭ *ekster* la lernejo la "Juna Spartako" havas siajn taskojn. Referato pri infanlaboro kaj ekspluatado de infanoj donis per trafaj ekzemploj el la ĉiutaga vivo la pruvon, ke eĉ en "civilizitaj" landoj (ne nur en Ĉinio) infanoj devas perlabori en peniga laboro kelkajn malmultajn monerojn por vivo, kaj ke la oficialaj leĝoj por protektoj de la infanoj estas tute nesufiĉaj. Inter la proponoj akceptitaj de la kongreso troviĝas unu pri eldono de kantaro por laborist-infanoj kaj unu pri unuecigo de la vestaĵo por organizitaj infanoj (pionir-tuko).[1] Dum la infan-kongreso kunvenis ankaŭ la gvidantoj de infan-grupoj, kiuj interkonsiliĝis pri la direktivoj de la estonta laboro.

Ankaŭ flanke de la plenkreska laboristaro tiu kongreso estis multe atentata. La

[1] (Ĉu Esperanto ne estas pli grava por tiu juna generacio? Ŝajnas, ke oni malatentis tiun ĉi punkton. *Red.*

laboremo, ĝojanimeco kaj entuziasmo de la infanoj donis al multaj aĝuloj novan kuraĝon por la batalo kaj certigon, ke neniam pereos, neniam mortos la altaj ideoj, ĉar kiam formortos la maljunaj batalantoj, ilin anstataŭos kun freŝaj fortoj nova generacio. *N. Barthelmess.*

Proceso kontraŭ la 500 ribelantoj en Rumanio

De post du monatoj okazas la proceso kontraŭ la ribelantoj de Tatar Bunar. En la pli ol 60 procestagoj ne jam ĉiuj 500 akuzitoj estas aŭskultitaj, ili certe ankaŭ ne ĉiuj trovas okazon sin defendi. Kontraŭ 127 el la 500 akuzitoj mankas ĉiu ajn akuzanta materialo. Sed tamen ili devis suferi la kruelaĵojn de la esplorkarcero dum tuta jaro, nur ĉar oni intermiksis iliajn familinomojn. La militarista juĝejo ankaŭ al ili ne donis okazon paroli pri la subprem- kaj torturagoj de la blankuloj.

Nun okazas la proceskunsidoj eĉ nokte, ĉar la registaro deziras, ke la proceso plej baldaŭ finiĝu. Laŭ ordonoj de la militaristaj instancoj la "gvidantoj" estu kondamnotaj senescepte al morto, kaj la plej teruraj karcerpunoj estu decidotaj al la kiel eble plej granda nombro de la akuzitoj. Pro tio oni povas atendi karceron de kelkaj mil jaroj entute. La proceso ankoraŭ daŭras en la Kiŝinev-a esplorjuĝejo (Rumanio).

Socialdemokrataj SAT-anoj!

Dum la V-a kongreso en Wien okazis frakcia kunsido de la socialistaj SAT-anoj. K-do Deubler-München raportis pri la ĝis nun farita laboro, kiu ĉefe konsistis el interrilatado kun kaj informado al diversaj unuopaj k-doj. La kunsido decidis, ke la Wien-aj k-doj transprenu la gvidadon de la frakci-laboroj kaj elektis tuj la k-dojn: Rinesl, Josef (2362), Rasztoczky, Daniel (3278), Jonas, Franz (1484), kiuj nun formas la frakcian ekzekutivon.

Konsiderante la relative malbonan staton de nia movado en socialdemokrataj partirondoj, la frakcia ekzekutivo decidis, koncentri la fortojn, por antaŭenpuŝi nian movadon en tiun direkton. Kompreneble tio postulas, ke ĉiu unuopa k-do laŭ morala devosento anoncu sin al kunlaboro.

La frakcia ekzekutivo urĝege petas ĉiun k-don, nepre respondi laŭpove la jenajn punktojn:

1. Kiel rilatas al Esperanto la oficialaj partirondoj en via urbo, distrikto, regiono, lando?

2. Kiel estas la stato de la E-movado en socialistaj rondoj?

3. Nomo kaj adreso de la partiestraro en via lando?

4. Nomo kaj adreso de la socialistaj ĵurnaloj en via urbo, distrikto, regiono, lando?

5. Ĉu vi havas interrilatojn al ·iu el tiuj gazetoj por enpresigi artikolojn, sendotaj de ni?

6. Ĉu vi povas liveri al ni artikolojn pri laboristaj (politika, sindikata, kooperativa, kultura) movadoj, kiuj estu presotaj en "S" kaj en la nacilingvaj ĵurnaloj?

La frakcia ekzekutivo povos plenumi sian malfacilegan taskon nur tiam, kiam ĉiu unuopa socialista k-do firmkore kunlaboras. Tion memortenu!

Ĉiujn skribaĵojn sendu al k-do Franz Jonas, Wien, XXI, Jedlersdorfer Platz 33.

Faŝista perfortago en Anglio

Kvar faŝistoj en London la 17. oktobro matene haltigis veturigiston de veturilo minacante per revolvero. En la veturilo estis 8000 ekzempleroj de la "Daily Herald" (organo de la angla Labour Party). La faŝistoj forveturis la veturilon kaj finfine ili puŝegis ĝin kontraŭ preĝeja muro, kie ili preskaŭ tute rompita forlasis ĝin. La angla policistaro arestis kelkajn tagojn pli poste 17 jaran faŝiston, en kies loĝejo troviĝis multe da materialo de la faŝista movado, kaj kiu ankaŭ dum esplorado konfesis sin kulpa. La aliajn tri kunagantojn oni ĝis nun ne trovis.

Daily Herald estas la organo plej vastigita en London, eldonita de la socialdemokrata partio. Do tiu okazaĵo montras, ke ankaŭ en Anglio la faŝista movado pli ampleksiĝas kaj precipe, ke ĝiaj anoj pli kuraĝiĝas.

A. A. Purcell forpelota el Ameriko?

La kurĉaso kontraŭ eksterlandaj revoluciuloj eĉ alprenas jenan formon, ke nun, flanke de la burĝa gazetaro en Ameriko, okazas agitado por elpeli A. A. Purcell, kiu kiel reprezentanto kaj estro de la angla sindikata kongreso partoprenas la kongreson de la amerika sindikataro. Oni precipe atakas lin, ĉar li estas samtempe reprezentanto de la sindikata unueco. Partoprenas la kongreson ankaŭ reprezentantoj de aliaj landoj, kontraŭ kiuj ĝis nun ne eĉ unu voĉo sin levis. Sed kontraŭ A. A. Purcell kaj kontraŭ aliaj revoluciuloj oni volas uzi la kontraŭkomunistan leĝon, kvankam Purcell estas socialdemokrato.

≡ RADIO ≡

El la radiofona parolado de la soc.-dem. ministro

A. Srba

La 8. septembro 1925 en Praha (Ĉekoslovakio)

"Anatol France profetis en sia romano: 'Sur la blanka roko', ke Rusio fariĝos foje alirebla por la okcidenta kulturo pere de pluvo da kolektivistaj vortoj, per kiuj ĝi estos superŝutata, helpe de artifike konstruotaj maŝinoj, direktataj de la okcidenta Eŭropo super Rusion kaj ĝian loĝantaron. Pri tio mi ĉiam rememoras kiam mi aŭdas la kontraŭon, per kiuj ni loĝantoj okcidentaj, estas superŝutataj dum la radiofonado el Moskvo.

Ne ekzistas forto kontraŭmetebla, kaj eĉ neniu pensas malhelpi la eksterlandan radio-disaŭdadon sur sia propra teritorio, same kiel ne estas eble malhelpi la disvastigon de la radioakceptiloj. Kion signifas tio? Multe pli ol iu ajn pensas, tio estas la plena liberiĝo de la penso, tio estas la internacia konkurado de la ideoj, tio estas la forigiteco de la ŝtatlimoj, de la nacioj, gentoj, la senlimigebla konkurado sur la kampo spirita.

Ankoraŭ mankas la unuiganta internacia helplingvo, kiu promesas fariĝi la rapide disvastiĝanta Esperanto, por ke estu plene donitaj la fundamentoj, sur kiuj kreskus la spirita unueco de la tuta homaro."

Trad. *F. H.*

Radio en Sovetio

Radiolaboratorio en Niĵnj-Novgorod komencas eksperimenti radiotelegrafadon kun Vladivostok. En Vladivostok estas konstruata speciala ricev-aparato.

* * *


Niĵni-Novgoroda radiolaboratorio je la nomo de Lenin daŭrigas transdonadon per mallongaj ondoj. Dum lastaj 2 monatoj la stacio transdonadis per ondoj je 20,5, 25, 26,5 metroj. Al transdonilo oni kondukas elektro-energion je 15—18 kvt. Aparato havas kupran katod-lampon je 25 kvt. de profesoro Bonĉ-Brujeviĉ. La stacio ricevis multege da leteroj kaj poŝtkartoj el Brazilo, Hindio, Aravio kaj antaŭnelonge el insulo Tasmanio (Aŭstralio) de radioamatoroj, kiuj bone aŭdas ĝin. Ĉu niaj k-doj radioamatoroj aŭdas ankaŭ ĝin?

* * *

Moskvaj uzinoj de Elektrotrusto ellaboras nun malgrandajn disaŭdigilojn laborantaj je distanco de 200—300 klm.

* * *

Narkompoĉtel (Popola Komisaroj de Poŝto kaj Telegrafo) projektas konstruadon de 2 grandegaj transdoniloj por kunligo Moskva—Nev-Jork kaj Moskva—Peking—Tokio. *I. Avrunin* (1122).



Nova radioakceptilo *(sen anteno)* proponita de k-do Pokrasov (Moskvo)

KL = katod-lampo V = Variometro
K = Fiksa kondensatoro AB = Anod-baterio
K_1 = Variebla kondensat. B = Baterio 4 volta
T = telefono. *(1122)*

Ni ekspedis la voĉdonilojn kun la antaŭa n-ro (57), al neabonantoj ni sendas ilin parte al la perantoj, kaj al izoluloj rekte.
Adm.

LASTAJ NOVAĴOJ

Ĉe Aldan (Siberio) oni konstruas novan urbon "Tammot". La urbo estos ligita per telefono kun novaj minejoj, kie oni trovas riĉegajn kvantojn da oro.

En Leningradon bone alvenis 2 italaj gidroplanoj. La aviadistoj estis tre gasteme renkontitaj, flanke de Leningradanoj.

(1122)

La striko de laboristoj en la ŝipokonstruejo de *Rotterdam* estas kvazaŭ finiĝinta. Strikas nur ankoraŭ parto en la konstruejo de Smit.

Laŭ sciigoj el *Batavia*, ĉe *Pindgaj*, orienta bordo de *Sumatra* disfalis ponto; 50 personoj estas netrovitaj.

En *Palermo* pluvego parte inundis dum kvin horoj la urbon kaj la elektra lumo estis difektita. Ekestis ĝenerala paniko. Fabrikoj kaj provizejoj estis plene subakvigitaj. Ofte la akvo atingis altecon de du metroj.

En *Tsingtau* 3000 viroj de la trupoj Tschang-Tso-Lin enŝipiĝis sur kvar kanonboatoj kaj tri transportŝipoj, por iri al *Raitschaŭ* kaj samtempe unuiĝi kun la ĉefa potenco de Feng por partopreni flankatakon al la unuiĝintaj kontraŭaj fortoj.

La metallaborista sindikato en Germanio rifuzis la decidon por la metalindustrio en la nordokcidenta grupo.

En Dortmund la tramistoj rekomencis la laboron ĉiulinie.

Komence de decembro malfermiĝos en Moskvo ĉinia Universitato kun la nomo Sun-Ya-Tsen, kiu akceptos 250 ĉinojn.



Baldaŭ aperas

La Morto de Blanjo

de **Jean Tousseul**

trad. **Léon Bergiers**

Prezo: 1.20 mk. g.

duobla volumo de

Biblioteko de Sennaciulo

Mendebla ĉe Administracio:

R. Lerchner, Leipzig, Colmstr. 1 (Germ.)



KRONIKO

Britio

BLES vigle laboras pro la alpreno de Esp. flanke de la Sindikata Konferenco. Konataj sindikataj oficialuloj Henson (maristo) kaj Elvin (oficisto) aniĝis. Novaj kursoj en Manchester, Londono, Braintree kaj Grays. "Skizo de Ekonomia Geografio" estas fintradukita, nur mankas mono por preskostoj. M. Starr verkis novan libron, "Laboristo Rigardas Ekonomian Sciencon", kiu estas laŭde recenzata. *2052*

Germanio

Halle. Dum kongreso de la komjunularo tutgermania okazinta la 14.—17. okt. k. j. en Halle (Germ.) estas disdonitaj flugfolioj, alvokintaj la junularon inter korespondadi kun la junularo ekstergermania *per Esperanto.* La flugfolio estas ĉiuflanke bone akceptita kaj atente legita. Do, sukceso por ni. Krome estas prelegita salutletero de la "komfrakcio el membroj de SAT".

Sovet-Unio

Minsk. Blankrusion vizitis ĉekoslovakia laborista delegitaro. Interalie inter delegitoj estis unu esperantistino — Anna

Je memoro de la 400jara datreveno de l' kampulbatalo apud Böblingen 1525

(Fino)

T. Gerber perdas 80 kunulojn de sia 200 anaro, atingas Stuttgart persekutita de la liguloj, kie la urbkonsilantaro volis pendigi la bravan Gerber, sed sukcesis al li forkuri al Esslingen. La fajfisto M. Nonnenmacher same falis en la manojn de la Junkro, estis ligata je paliso kaj tute malrapide rostita. Dume la feŭduloj diboĉis, amuziĝanta je la doloroj kaj martirplena morto de la viktimo.

De nun la batalŝanco por la justa afero estas perdita por la kampuloj en ĉiuj estontaj okazintaĵoj.

Jaklejn [1]) ne jam cedas kaj klopodas kolekti la rifuĝintan kampulanaron. En la proksimeco de montetoj Asperg (kie ankaŭ hodiaŭ pluraj politikaj krimuloj estas malantaŭ malliberejaj muregoj) li estis ekkaptita de la tiea prokuroro kaj senkapigita.

Böblingen estas forte kontribuita de la liguloj, al la civitanoj forprenitaj armiloj kaj kirasoj. Pro ribelo de la incititaj mizeruloj forkuris la perfida Vogto Breitŝvert al Pforzhejm. La venko kaj subpremo pri la franka kaj ŝvaba armeoj sukcesis al la liguloj plej parte per Götz de Berlichingen [2]), kiu estis elektita intertempe kiel gvidanto de la "Hela, kristana aro kiu gvidis la kampulojn al senŝanca atako al la Frauenberg (monto proksime de Würzburg) kaj tiel apartigis 7000 kampulojn de la batalo, por fine mem forkuri. Nur Florian Gejer kun sia nigra aro liveris al la liguloj kelkajn malfacilajn batalojn ĝis kiam li fine fariĝis viktimo de murdo, farita de sia propra bofrato, pro klasperfido.

Pereigita la franka armeo, batitaj la kampuloj kaj ministoj el Turingio, mortigita ilia eminenta gvidanto Tomas Münzer [3]). En la sango de 30000 kampuloj, virinoj kaj infanoj estas sufokita la ribelo en Alzaco. Ankoraŭ flagras la ribelo dum tiu somero en supra Ŝvabio, sed vane. Rekomencas la antaŭa sistemo.

La nombro de la mortigitaj kampuloj estas proksimume 130000 kampuloj kaj laboristoj ekster juro! Supren al vera libereco!

En la urboj disvolviĝas iom post iom el la simpla primitiva metio la manufakturlaborejo kun sia ankoraŭ primitiva laborraciigo. Kelkiu servut-kampulo rifuĝis el la servuteco al la urbo, klopodas trovi laboron.

La maŝino ebenigas al si la vojon, potence la kapitalismo movas la flugilojn. La urbaj kapitalistoj sin montras komence revoluciemaj en la batalo kontraŭ la malnovo kontraŭ la mezepokaj cirkonstancoj sub feŭdeco kaj ekleziularo. Malgraŭ la forigo de la iamaj premigaj rimedoj kontraŭ li, troviĝas la etkampulo kaj lia frato en la urbo, la industrilaboristo en mizera situacio. Libera de mezepokaj katenoj, estas li samtempe ankaŭ eksterjure, senŝirma kontraŭ la ekspluatado per la grandkapitalistoj, la novaj subpremigantoj. Ankoraŭ hodiaŭ ĝemas la etkampulo: Aŭskultu, kia estaĵo tio estas? ni en tia mondo resaniĝi ne povas! La juĝeja pedelo estas hodiaŭ al la etkampulo sur la kampo tute ne nekonata homo. Al la laboristo estas detenata la dekono de sia mizera salajro. Ĉio, kion li manĝas, kion li ĉiutage aĉetas estas ŝarĝita per imposto kaj dogantributo. Ĉi-kiu sin incitas pro tio flugas straton, fariĝas senlabora, povas mortaĉi kun virino kaj infanoj. La honestaj konsilantoj ne plu bezonas okupiĝi pri la pendigado, centmiloj, por forkuri el la mizero, sin mem pendigas, venenigas. Ne malpli mortaĉas je malsat-malsano.

Je la loko de ligaj dungituloj troviĝas hodiaŭ la policanaro. Ankaŭ junkrojn Georg kaj tiranojn, ni pli multe havas ol ruĝajn hundojn. Niaj prauloj 1525 nin kvazaŭ alvokis:

Hejmen iras ni venkitaj.

Niaj genepoj estos pli bone ekipitaj. Pli bone ekipi nin ni nur povas, kiam la etkampuloj kun la kampo- kaj industrilaboristaro batalas en komuna fronto. Ne ope konsumiĝi, sed komune batali kaj venki estas nia tasko. Vojomontrantaj estas al ni, ne lastfine, la spertoj de la kampularmilito 1525. Radianta estas antaŭ ni la vojo kaj batalo de la laboristoj kaj kampuloj de tiu lando, kiuj ankaŭ "venkite" eliris militon, sed kie ne estas akceptataj Dawes-komisioj kun florbukedo. Kie la kondiĉoj de la laboranta amaso sin ĉiutage pliboniĝas. Temas nun komune ekstarigi ankaŭ en Germanio tian potencon de la laboruloj.

Leviĝu en mizer' dronanta . . .

Kompilis *H. N. (511)*

[1]) Jäcklein Rohrbach, elp. Jeklejn Rorbaĥ.
[2]) Götz de Berlichingen, elp. Gec de Berliĥingen, ankaŭ kavaliro.

[3]) Tomas Münzer, elp. Tomas Mincer, distinga karaktero. Samepokulo de D-ro Martin Luter, ambaŭ teologoj, sed kia diferenco inter ambaŭ!

Boŭdo. La 5. okt. lokaj esperantistoj SAT-anoj aranĝis kunvenon kun partopreno de k-dino A. Boŭdo, kiun krom tio vizitis multaj laboristoj kaj oficistoj. Post esperanta raporto de eksterlanda k-dino ekŝutiĝis demandoj pri vivkondiĉoj de laboristaro en Ĉekoslovakio, al kiuj respondis k-dino Boŭdo, ĉar ĉiuj raportoj kaj demandoj de ĉeestintoj estis parolataj aŭ tradukitaj esperante, ideo de lingvo internacia, kiu kunligas tutmondan proletaron, plifirmiĝis en niaj laboristaj rondoj.

Ni petas ĉiujn preterpasantojn Blankrusion laboristojn-esperantistojn, viziti Minskan SAT-organizaĵon, nur sciiginte nin pri sia alveturo kelkajn tagojn antaŭe, por ke ni povu vin renkonti ĉe stacidomo kaj pretigi ĉion eblan. Skribu laŭ adreso: Sovet-Unio, Minsk, poŝtkesto 33. *P. Kirjusin.*

Kojdanovo. Esperanto bone progresas ĉitie. Jam de longe laboras 2 kursoj de Esperanto kaj baldaŭ, verŝajne, ni povos malfermi esperantajn-rondetojn ĉe lokaj lernejoj. Gelernantoj, ne estante dume perfektaj en Esperanto, jam komencis interkorespondadon kun eksterlandaj laboristoj. *P. Kirjusin.*

Kiev. La 13. okt. venis Kievon delegitaro de ĉekoslovakiaj laboristoj. Inter la delegitoj estis esperantistino k-dino A. Boùda. La 14. okt. vespere k-dino Boùda vizitis klubejon de Kievaj esp-istoj, kie okazis solena kunsido. Ĉeestis ĉiuj lokaj SAT- kaj SEU-anoj kaj multe da publiko. Post salutparoladoj okazis vigla diskutado pri nuna situacio de ĉekoslovakia laboristaro kaj pri esp. movado. La kunsido havis grandan sukceson kaj tre ekinteresis la publikon pri esperanto. Post la vizito al ni de k-dino Boùda ni esperas pri granda vigliĝo de l' movado en nia urbo. *728*

Skribu laŭ malsuprenomita adreso:

Al k-do Tomilov Anatolo — por grupo "Komenco", Lebedevskaja strato, domo 30/13 de l' Ĉasovitina, urbo Petrovskij Zavod, Zabajkalskoj gub. (Transbajkalia gubernio) Siberio — Sovet-Unio. *Anatom.*

Ivanovo-Voznesensk. Nia loka regiona fako de SEU organizis Esperanto-semajnon de 1. ĝis 14. okt. ĉi jaro. Estis faritaj: literatureksponzicio en la fenestrego de loka librejo, lekcioj: 1. ĉe fervojistoj, 2. en salonego de kom. Komitato, en domo de instruistoj. Organiziĝis kursoj: 1. en fervojista klubo, 2. en klubo de uzino "Zarjadje", 3. en domo de geinstruistoj, 4. ĉe konstrulaboristoj, 5. ĉe kom. komitato. Estis presitaj en loka gazeto alvoko, anoncetoj kaj 3 artikoletoj unu el "Sennaciulo" pri "Narkompoĉtel kaj Esperanto" (marko Popova kaj poŝtkartoj). *Esperkor.*

Svisio

Basel. Malfermiĝis nova kurso kun 20 partoprenantoj laŭ rekta metodo. Komence mi donos 2 ĝis 3 preparajn lecionojn, poste laŭ "Petro". *K. Deutschle.*

KORESPONDADO

TARIFO

Korespondado: Unu enpreso: Simpla trilinia anonco kostas 0,50 mk. or., ĉiu plia linio la samon.

Ni nur akceptas anoncojn kun samtempa pago.

MALLONGIGOJ: L = *letero.* PK = *poŝtkarto.* Pl = *poŝtkartoj ilustritaj.* PM = *poŝtmarkoj.* bfl = *poŝtmarko sur bildflanko.* k.ĉ.l. = *kun ĉiuj landoj.* esp.aĵo = *esperantaĵo.*

Ĉiuj petantoj pri korespondado havas la **devon, nepre respondi almenaŭ unu fojon al ĉiuj petoj koncernantaj la fakon, por kiu ili sin enskribigis.**

Britio

— K-do *K. Cook* (19j.), Goolden St. 4, Hr. York St. c. m. *Manchester,* kun gek-doj en Germanio kaj S. S. S. R.

Ĉekoslovakio

— K-do *Ludvik Jakoubé, Velké-Hamry.* n-o 19, dez. koresp. kun amatoroj entomologaj, speciale pri skaraboj (laŭeble ankaŭ interŝanĝi).

Germanio

— *Junaj pioniroj* (jun-spartakistoj) dez. koresp. kolektive kun pionirgrupoj ĉiul. Adr. J. S. B., *Leipzig-Stötteritz,* Holzhäuserstr, 87 (Stolze).

— K-do *Fritz Traut,* Am Lindenwald, 62, *Griesheim a. M.,* dez. koresp. pri ĉ. temoj, L, PK, Pl, bfl. k. ĉ. l., certe resp.

— K-do *Ernst Kissler,* Hochstr. 7, *Griesheim a. M.* serĉas gekoresp-antojn el ĉ. l. por gelernantoj de la "Lab. Junularo Frankfurt" pri ĉ. temoj, L, PK, Pl, bfl.

— K-do *Karl Göckl,* Minervastr. 30, *Nürnberg,* dez. koresp. pri ĉ. temoj en esp. kaj angla lingvoj, L, PK, Pl, k. ĉ. l. Respondo garantiata.

— K-do *Karl Ahrend,* Hebelstr. 35, ptr., *Leipzig-Lindenau,* serĉas korespondantojn por siaj 25 gelernantoj. Certe resp.

— "Partoprenintoj de esp. kurso" dez. eksterl. koresp-adon por pli perfektiĝi. Temoj: sport-, liberpensul- kaj lab. movadoj, L, PK, certe resp. Adresu al: K-do *Oskar Munsche,* DelitzscherStr.62 II, *Leipzig-Eutritzsch.*

— Kiu ŝatas seriozan koresp. pri politikaj kaj ekonomiaj temoj skriku al: K-do *W. Kampfrad,* Heinrich-Schmidt-Strasse 5, *Leipzig-Schönefeld.*

— K-do *H. Dey,* Weuenstr. 17, *Essen-West,* dez. koresp. esp.-stenografe laŭ sistemo de Schramm k. ĉ. l. certe resp.

Sovet-Unio

— K-do *Nikolao Korolev,* N. Obrazcovi polk, *Vladimir,* k. ĉ. l. pri div. temoj.

— K-do *Sidorov Andreo,* militservanto, N strelkovi polk Dondivizii. *Rostov s. Don.* dez. koresp. k. ĉ. l. L, PK, Pl.

— K-dino *Zemskova Valentina,* ĵurnalistino, *Novonikolajevsk,* (Siberio), str. Kommunistiĉeskaja, 82, dez. kores. kun k-doj el ĉ. l.

— K-do *Jan Klys,* Poŝtkesto, 33, *Minsk,* dez, serioze koresp. pri lab. vivo, movado kaj kun instruistoj pri instruado k. pedagogio. Sendu unue artikol-leterojn, al PK kaj mallongaj let. ni ne resp.! Ankaŭ sciigu, ĉu vi permesas, ke viajn artikolojn ni uzu por niaj gaz.

— K-do *L. M. Krasnjanski,* (scienca kunlaboranto ĉe Laboratorio de Fiziologia Ĥemio), ul. Engelsa, 73, kv. 6, *Rostov s. D.,* pri fiziologiaj kaj fiziologieĥemiaj temoj. Interesiĝas pri laceco kaj duobla inervacio de laŭlarĝstria muskolaro.

— K-do *P. Kapustinski, s. Lozovatka,* Krivorog. okr., L. Pl, k. ĉ. l., pri ĉ. temoj.

— K-do *Anatolo Voloĥov,* teknikisto, Kambarovska, 48, *Tambov,* k. ĉ. l.

— „Grupo Esperantista" d. *Voroncovo-Nikolaevskoe,* ĉe st. Torgovaja (Kaŭkazo) kun alilandaj Esperantistoj.

— K-dino *Tatiano Alekseeva,* Cementfabriko, "Ruĝa Oktobro", *Volsk,* Sarat. gub. Pl, L, k. ĉ. l.

— Ĉefa inĝeniero de Radio-fako MGSPS. (Moskva Gub. Sindikataro) k-do *A. Vinogradov* korespondas kun radiistoj-specialistoj de tuta mondo. Interŝanĝe sendas rusan gazeton "Radio-Amatoro". Akurate respondas. Adresu: Al inĝ. *A. V. Vinogradov,* Radio-stacio MGSPS, Bol. Dmitrovka 1, *Moskvo.*

Nekrologo

La 9. oktobro mortis nia aktiva membro

K-dino Mara Salber (1623)

Honoron al ŝia memoro

SAT-anaro Landshut i. B.

Alvoko

Juna proleta verkisto, kiu scikonas 6 lingvojn, kaj preparas eldonon de "Proletaria Legolibro" en germana lingvo petas la k-dojn el Italio, Portugalio, Polio, Hispanio, Anglio kaj Judlingvio sendi al li sialingvajn poemojn k. malgrandajn prozaĵojn de anti-aŭtoritatema enhavo. Kiel rekompencon li sendos al ili po libron k. antaŭe div. antiaŭtoritatemajn gazetojn germanlingvajn. Ankaŭ esp. prol. verkistoj tiu-direktaj bonvolu partopreni ĉi-aferon. Oni adresu:

K-do *Ch. F. Hochhäuser,* Poste restante *Breslau III.* (Germanio)

PRESEJO: UNS-PRODUKTIVGENOSSENSCHAFT, LEIPZIG (GERMANIO)